

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1384 (11) | novembro 2023

**Kelkaj demandoj al D-ino
Gong Xiaofeng (Arko) | 219**

**INK – pli ol konkurso:
Esperanto kiel ponto-lingvo | 228**



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševčenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Kovrilpaĝa foto: John Huang

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org
Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifoj (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimуме €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
tel.: +31-10-436-1044
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



219

Kelkaj demandoj al D-ino Gong Xiaofeng (Arko)

Esperanto ŝanĝis mian sorton. Sen Esperanto, ne estus nuna mi. Tio estas ekster dubo. Kompreneble, Esperanto ludas malsamajn rolojn en diversaj etapoj de mia vivo.



223

Rezultoj de la UEA-enketilo: 2^a raporto de Duncan Charters, Prezidanto de UEA

95% de la membroj trovas kompreneblaj kaj utilaj la kvar kolonojn proponitajn por nia strategia planado, KIRI.



228

INK – pli ol konkurso: Esperanto kiel ponto-lingvo

La celo de la konkurso estas stimuli verkadon de noveloj, interkulturecon, aldone subteno de originala Esperanto-literaturo, transdonado de premioj al la brilaj verkistoj kaj eldonado de libro kun abundo de legindaj noveloj.



234

Vortoj: praktiku lingvojn saltante

Por pli amuziĝi lernante kaj praktike lingvojn, estis kreita eduka komputila ludo *Vortoj*. Ĝia nomo estas tute intence en Esperanto, ĉar ĝi estis koncipita en la Esperanta organizo E@I.

Furoraĵoj de la kongresa
libroservo en Torino | 225

Recenzo
Revoj de infanoj | 226

Letero de leganto |
Lingvo
Interpretante
Globalizitan Mondon –
gravaj argumentoj por
subteni esperantistojn

Kulturo | 227
Universala Kongreso
Unua ZEO* en Montrealo

Kulturo | 230
Pri sukero, katoj kaj
mondo de plej diversaj
noveloj

Komisiono de UEA
por agado en Eŭropo | 231
Kiom da armeaj grupoj
havas la papo? Kaj kiom
da eŭropaj esperantistoj
havas Eŭropa Esperanto-
Unio?

Landa agado | 232
Ni plu japaniĝu!

Evento
15-a Kongreso de
Esperanto en la Ŝtato
San-Paŭlo

Kulturo | 233
La forto de la spirito

Strato en Kievo ekde
nun portas la nomon
de fama esperantisto | 235

Afriko vokas | 236
Kial mi sentas min
bone en Afriko?

Landa agado | 237
Promeno tra historiaj
lokoj de la Zagreba
Esperantujo

Oficiala Informilo

Fake, Science kaj | 238
Profesie tra la mondo
Ĉu unua spuro de vivo
ekstertera?

Estraro
de Universala
Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro
kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsau, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge
Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj,
Kulturo, Kongreso, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro
RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel
(Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto,
Terminologio, Meza Oriento kaj Norda
Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun
Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj

kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Postel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute
(Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Postel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng
(Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun
CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian
District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Postel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo
(Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de
Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Postel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva
(Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu
(Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Gangnam Bamsom
Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matušov
kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Ing. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



Kelkaj demandoj al D-ino Gong Xiaofeng (Arko)

Dum la Universala Kongreso en Torino Gong Xiaofeng eniris la Estraran teamon de UEA. La redakcio de la revuo Esperanto uzis la okazon por intervjui ŝin.

Revuo Esperanto: *Kiun rolon en via vivo ludis Esperanto? Ĉu tiu rolo ŝanĝiĝis dum la jaroj?*

Gong Xiaofeng: Esperanto ludis kaj ludas tre gravan rolon dum mia vivo. De kiam mi ekkonis Esperanton jam pasis 43 jaroj. Mi de siatempa studento handikapula paŝon post paŝo fariĝis doktoro kaj universitata profesoro, tio malofte troviĝas kaj malfacile atingeblas eĉ por miaj samaĝuloj. Se oni taksus min sukcesulo, mi certe dirus, ke Esperanto sukcesigis min. Esperanto ŝanĝis mian sorton. Sen Esperanto, ne estus nuna mi. Tio estas ekster dubo. Kompreneble, Esperanto ludas malsamajn rolojn en diversaj etapoj de mia vivo. Mi estis universitata studento, hazarde mi vidis artikolon kaj bazan lecionon pri Esperanto en iu ĵurnalo, komence

mi nur interesiĝis pri tiu bela lingvo, ĉar oni afiŝis, ke Esperanto estas ŝlosilo de eŭropaj lingvoj, ĝi estas facila kaj logika lingvo. Sen klaraj kaŭzoj mi tuj ŝatis ĝin, eble, ĝuste pro la interna idealo? Mi ne scias. Mi tute ne atendis, ke tuj baldaŭ ĝi fariĝos lumo, kiu lumigos mian koron kaj eltiros min el grizaj tagoj.

Estis en la jaro 1978. Universitatoj rifuzis akcepti min ĝuste pro mia handikapo. Siatempe, ĵus finiĝis la *kultura revolucio*, mia lando rekomencis la tutlandan enir-ekzamenon al altlernejoj, sed nur 3-5% de kandidatoj povis trapasi la enir-ekzamenon kaj havis ŝancon studi en universitatoj. Feliĉe, mi estis unu el la 5 sukcesintoj el 200 abituriintoj en nia mezlernejo; malfeliĉe, mi estas handikapulo, tiam oni diris, ke handikapuloj ne havas rajton studi en

universitato, ĉar neniuj universitato volas varbi kriplan studenton. Mi estis tiam nur 16-jara, en miaj senzorgaj jaroj, kaj ankoraŭ fantaziis pri mia revo iri al universitato, sed la universitato, por kiu mi petis, rifuzis akcepti min.

Finfine pro miaj altaj poentoj, kaj pro tio, ke mia patrino vizitadis la Jiangxi-Provincan Alteduko-Agnoskan Oficejon, pledante kial ŝia filino ne povas iri al universitato; la gvidanto estis tre simpatia, kompreneble, mia patro uzis diversajn sociajn rilatojn por propeti kun ĉi tiu gvidanto. Okaze estis varbado de 25 pliaj homoj por kompletigi la forton de la universitataj laboratorioj. Ĝi estas du-studjara, sen bakalaŭreco. Komence mi ne volis, ĉar mi volis bakalaŭran studon, kiu daŭras 4 jarojn. Sed miaj gepatroj konsilis al mi kapti ĉi tiun ŝancon, kvankam estas nur por 2

studjaroj; tamen post diplomiĝo, tiuj studentoj restos en la universitato kiel laboratoriaj teknikistoj. Kia bona posteno! (En la 1980-aj jaroj, ĉiuj universitataj diplomiĝintoj ricevis laborlokojn fare de la ŝtato.)

Mi kontraŭvole akceptis la konsilon de miaj gepatroj, sed profunde mi estis deprimita pro la diskriminacio de mia handikapo. Mi perdis mian rideton kaj fariĝis silenta knabino. Ĉar la poentoj de mia Kemio (studobjekto) estis altaj, do, mi estis aranĝita al la kemia fako. Mi pensis, ke mi restos en la universitato post du jaroj, sed ne atendis, ke antaŭ mia diplomiĝo, la universitato esprimos sian rifuzon pro tio, ke la universitato fariĝos internacia, kaj ke mia handikapa bildo influos la universitaton. Subite mi havis sentojn de forlasiteco kaj perdis ĉiun intereson pri mia fakstudo, mi apenaŭ povis enkapigi unu vorton antaŭ la malfermita lernolibro, tamen mi trovis, ke nur Esperanta lernolibro povas trankviligi min. Ekde tiam, Esperanto fariĝis mia trankviligaĵo kaj mia spirita kolono. Mi forlasis la universitaton kaj komencis labori kiel kemia analizisto en la fabriko, kie mia patro laboris kiel ĉefinĝeniero. Mi havis malpezan laborŝarĝon. Tial mi pasigis multe da tempo por lerni nian lingvon. Kiam mi fariĝis 21-jara, subite mi vekigis kaj demandis min kial mi malĝoju pro mia handika-

po? Kial mi zorgu pri la diskriminacio de aliaj homoj kontraŭ mi? Mi skribis en la taglibro: "Ĉio komenciĝos je la aĝo de 21 jaroj". Mi anoncis min al la koresponda E-kurso, kaj hazarde la korespondaj instruistoj vizitis mian urbon. Ili laŭdis min kaj sincere invitis min partopreni la kunvenon okazigotan post du monatoj. Mi unuafoje sola foriris al la urbo en najbara provinco kaj ricevis neimageblan varman akcepton. Ĉiu respektis min kaj donis al mi grandan helpon ne nur en la vivo sed ankaŭ en la lernado. Iu donis al mi la adreson de sia japana korespondanto, kaj mi komencis korespondi kun alilandanoj. Post la hejmenreveno, la loka E-grupo kaptis min kaj tre baldaŭ mi fariĝis la grupestro kaj gvidis lokajn E-aktivadojn. Esperanto denove igis min gaja homo.

Poste, per Esperanto, mi kontaktiĝis kun multaj esperantistoj en- kaj eksterlande, de profesoroj, gvidantoj, oficistoj al inĝenieroj, laboristoj, oficiroj, kamparanoj, studentoj ktp., miaj horizontoj plivastiĝis. Mi havis plian prienson. Ĉu mi devas resti en la fabriko ĝis emeritiĝo? Ĉu ĉi tio estas la fino de mia akademia kvalifiko? Kial mi ne povas reiri al la universitato por daŭrigi miajn studojn? Tiutempe, la politiko de enir-ekzamenoj en universitatoj de Ĉinio ŝanĝiĝis, kaj ĉiu handikapulo havas rajton iri al altlernejo. Finfine post

preskaŭ du jaroj da batalo, mi prenis la malŝparitajn studojn, inkluzive la anglan, memstare studis universitatajn kursojn, kaj finfine sukcesis la tutlandan enir-ekzamenon por magistras studentoj. Mi forlasis la fabrikon kie mi laboris dek jarojn, kaj pasigis multe da tempo por lerni Esperanton kaj komencis novan studon. Mi ŝatis ĉi tiun malfacile gajnitan ŝancon kaj metis mian tutan tempon kaj energion en miajn studojn.

De tiam Esperanto fariĝis mia ŝatokupo, mi ne plu viglis en la E-movado, tamen mi ne tute perdis kontakton kun esperantistoj, mi ĉiam havis korespondadon kun kelkaj famaj E-veteranoj. Poste, vere la ĉielo favoris min, mi eĉ ricevis postenon en la universitato kaj fariĝis instruisto post mia magistriĝo. Dek jarojn poste mi promociiĝis de docento al vic-profesoro kaj finfine al profesoro. Kiam mi fariĝis vicprofesoro, mi revenis al nia E-movado, sed Esperanto ankoraŭ nur estis mia ŝatokupo. Mia faklaboro estis en la unua loko.

En 2007, post kiam mi revenis el Britio, kie mi restis 12 monatojn kaj multe kontaktis kun britaj esperantistoj kaj praktikis nian lingvon, mi ne nur gvidis Esperanto-agadojn en la provinco, sed ankaŭ organizis multfoje Esperanto-kursarojn kaj seminariojn en Ĉinio, eĉ internacie, la 45-an ILEI-konferencon kaj ILEI-seminariojn en Orienta Azio. Mi mem multfoje partoprenis la Universalajn Kongresojn kaj ILEI-kongresojn. Mi instruis Esperanton en mia universitato kaj fondis E-asocion por studentoj, gvidis E-studentojn al la internaciaj kunvenoj. En tiu ĉi periodo, aparte en la kvara jardeko, Esperanto okupis grandan kaj gravan lokon en mia vivo. Esperanto jam ne plu estas mia ŝatokupo, sed granda hobbio.

Revuo Esperanto: *Kaj ĉu ŝanĝiĝis, laŭ via opinio, Esperantujo mem?*

G.X.: Laŭ mia opinio, ne Esperantujo mem ŝanĝiĝis, sed esperantistoj kaj modernaj teknikoj, ekzemple, la interreto iomete ŝanĝis Esperantujon. De post la kreado de Esperanto, la mondo ŝanĝiĝis. La mondo fariĝis pli malgranda. Interreto alportis rimedojn, kiuj modifis la rilatojn inter la homoj. Ni





ne plu bezonas atendi unu monaton por ricevi leterojn de esperantistoj de alilandoj, ni havas Esperantajn komunumojn, ni havas pli facilan, pli rapidan kaj pli rektan kontakton inter esperantistoj. En Esperantujo ni ĉiuj estas homoj kun homoj. Se la nombro de esperantistoj grandiĝas, sekve de tio ankaŭ Esperantujo grandiĝas. Esence esperantistoj estas fratecaj, simpatiaj, varmkoraj, pacemaj.

Revuo Esperanto: *Kiaj estas viaj planoj kaj revoj, ligitaj kun via estraraniĝo en UEA?*

G.X.: Fariĝi estrarano mi ja tute ne atendis. Por mi estas granda defio. Sed mi klopodas per ĉiuj miaj fortoj eklabori kune kun aliaj estraranoj. Por mia estrara laboro, mi ankoraŭ ne formis maturan kaj detalan planon, sed nur kelkajn unuajn ideojn. Ĉi tie, mi esperas ricevi ĉies subtenon kaj helpon, kaj mi provos mian plejblon por bone fari mian laboron.

Temas pri universitataj laboroj (ekster Eŭropo) kaj edukado, mi opinias, ke grave estas kunigi universitatojn kaj antaŭenigi Esperanto-instruadon en lernejoj je ĉiuj niveloj. Brile laboras la “Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj” (ESF/UEA/ILEI/TEJO kun IrEA), kiu, gvidate de Renato Corset-

ti, ĝis nun jam okazigis 43 sesiojn de “Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj”. Pri-virina agado estas mia alia grava tasko, fakte ĝia agado estas iom malfacila, ĉar la esperantistoj vivas sub malsamaj vivkondiĉoj kaj je diversaj niveloj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj. Tamen, ĝojinde, tia agado iel daŭras nun eĉ en Afriko, ekzemple, renkontiĝo de afrikaj virinoj kadre de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Senegalo, agado de la Esperantista Virina Asocio en Afriko.

Mi ne multe revas, sed ŝatas pli multe labori. Mi esperas, ke pli da homoj en la mondo lernu bone kaj uzu Esperanton bele kiel la duan lingvon.

Revuo Esperanto: *Ĉu vi ŝatas vojaĝi? Kiu estis la plej interesa loko, kiun vi vizitis dank’ al Esperanto?*

G.X.: Jes, kompreneble. Mi fakte estas homo, kiu tre interesiĝas pri novaj aferoj, ŝatas ĝui malsamkulturan sperton. Kvankam mia unua vojaĝo eksterlanden en la jaro 2006 ne estis pro Esperanto, mi ricevis financadon de la Ĉina Stipendia Konsilio por fari unujaran esploradon en Britio, tamen dank’ al Esperanto, mia restado tie donis al mi neforgeseblan sperton pro Esperanto. Ekde tiam, ĉiuj miaj vojaĝoj al eksterlandoj ĉiam rilatas al Esperanto. Pro Esperanto mi konatiĝis kun multaj esperantistoj, ĝuis belegajn pejzaĝojn kaj spertis malsamajn kulturojn. Estas multaj interesaj lokoj kiuj allogis min, la plej norda parto en Skotlando, la rekontiĝo kun lokaj esperantistoj en Ĝenevo, ktp, sed se temas pri aferoj, mi povas tuj eldiri. En 2015, transirante la straton en Lillo, Francio, mi hazarde renkontis la nepon de L.L. Zamenhof, D-ron Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, kiu sola marŝis renkonte al mi. Mi hezitis dum sekundo, kaj tuj turnis min al li, salutante lin. Li haltis, ridete konversaciis kun mi, kaj ni eĉ faris kunfoton.

Revuo Esperanto: *Vi instruas Esperanton. Ĉu vi povas rakonti pri viaj plej talentaj lernantoj? Kaj pri iuj interesaj, eble eĉ amuzaj momentoj dum instruado?*

G.X.: Mi oficiale gvidis 8 kursojn nedevigajn en mia universitato, entute

621 studentoj aliĝis. Krome, mi gvidis ankaŭ postlecionajn E-studgrupojn kun pli ol 100 studentoj. Inter ili, la studentoj el tiuj postlecionaj studgrupoj estas pli diligentaj, talentaj kaj aktivaj ol tiuj studentoj el nedevigaj kursoj, ili helpis min organizi diversajn E-aktivadojn en la universitato, akceptis eksterlandajn esperantistojn, ekzemple, karavanojn el Koreio kaj Nepalo. Ili oficiale fondis E-asociacion por studentoj kaj multfoje ricevis laŭdojn el la universitato. Eĉ 24 studentoj el ili dum la vintraj ferioj en 2011 sekvis min al la urbo Guangzhou por partopreni la monatan Vintran E-kurson organizitan de ILEI-Ĉinio (mi estis la sekciestro, Dennis Keefe gvidis la kurson), kaj vintre en la sekvanta jaro 2012, 10 studentoj aliĝis al E-kursaro en la insulo Hainan, du el ili trapasis la KER-ekzamenojn B1.

La unua prezidanto de la Esperanto-asocio por studentoj nomiĝas Xionghui (Urso), lia fako estis mekanika kaj elektra inĝenierado, nuntempe li laboras en la urbo Shengzheng. E-aktivulo en loka E-movado, kiam li oficvojaĝas en Eŭropo, li ofte kontaktas kun lokaj esperantistoj per Amikumu. En sia dua studjaro li elektis mian E-kurson, sed poste mi trovis ke li refoje aperas en mia kurso. Mi atentis lin kaj invitis lin al mia oficejo, pruntis E-librojn kaj gazetojn al li, kiu tuj baldaŭ fariĝis mia plej bona asistanto. Li ankaŭ estis el-



stara ĉe sia propra fakstudo, pro tio li estis rekte rekomendita sen ekzameno daŭrigi sian magistran studon en la universito, do li restis ĉe mi ĉe la universitato dum 6 jaroj. Antaŭe krom sia naskiĝurbo kaj la urbo Nanchang kie li studis, li ne vizitis alian urbon. Sed pro Esperanto li vojaĝis kun mi al aliaj provincoj, eĉ al Koreio. Li estis helpanto de BEK-kurso gvidata de Dennis Keefe en la urbo Guangzhou. Li akompanis profesoron Ronald Glossop el Usono kaj S-ron Laŭlum dum monato. Pro tio lia buŝlingva nivelo altiĝis tre rapide. Antaŭ nelonge li skribis per tujmesaĝilo, ke li tre dankas min koinigi kaj lernigi al li Esperanton. En la E-instruado, mi trovis, ke preskaŭ ĉiuj studentoj ne fizike konversacias kun alilandanoj eĉ dum sia angla lernado; kiam mi invitis la francan esperantistinon Fransoazo Oazo rete al nia E-kurso, ŝi unue prezentis siajn familion kaj vilaĝon, poste ludis kvar muzikaĵojn per violono, multaj studentoj estis tre ekscititaj kaj lasis mesaĝojn post la leciono: *Profesoro Gong, mi tre volas paroli kun ŝi, sed mi ne kuraĝas*. Ĉinaj studentoj, aparte tiuj el la unua aŭ dua studjaro, plejparte estas timemaj. Okaze de la Zamenhof-tago en 2021, mi proponis, ke nia klaso okazigu poem-voĉlegadon en Esperanto. Komence, al ili mankas memfido, ĉiuj malkaŝis, ke ili neniam aperis sur la scenejo en arta programo.

Sed mia kuraĝigo finfine vekis ilian intereson. Mi donis al ili 4 poemojn verkitajn de Zamenhof, ili mem dividis la taskojn, eĉ faris detalan planon: kiu frazo estas voĉlegota sole, kaj kiu frazo estas voĉlegota ĥore, aŭ ripete ktp., vere interese. Miaj studentoj diris al mi, ke Esperanto vere vastigas ilian horizonton.

Revuo Esperanto: *Bonvolu rakonti iomete pri via sperto de laboro en kaj kun ILEI.*

G.X.: Veredire, antaŭe mi ne aŭdis pri la ĉina sekcio de ILEI, kvankam mi laboris en la universitato dum multaj jaroj. En 2008, iutage mia amiko Hosemo subite demandis min ĉu mi volas restarigi la ĉinan sekcion de ILEI, kiu pro ia kaŭzo jam malaperis antaŭ kelkaj jaroj. Do, mi konsentis kaj akceptis la taskon. Finfine, helpe de miaj kolegoj ni restarigis la ĉinan sekcion de ILEI en la jaro 2009 kun 20 pagantaj membroj. Baldaŭ la ĉina sekcio fariĝis la plej granda sekcio en ILEI, la nombro de membroj iam atingis 130. Por antaŭenpuŝi nian E-instruadmovadon en Ĉinio kaj altigi la lingvan nivelon de la E-instruistoj, mi organizis diversajn E-kursojn some-re en norda Ĉinio kaj vintre en suda Ĉinio, samtempe ĉiujare okazigis tutlandan seminarion pri E-instruado en malsamaj urboj. Por ne nur ĉinaj famaj E-instruistoj: mi invitis ankaŭ el



Germanio, Italio, Usono, Japanio, Koreio. Krome, la ĉina sekcio kunlaboris kun la korea kaj japana sekcioj, ni kune okazigis 5 sesiojn pri ILEI-seminario en Orienta Azio por diskuti kaj solvi la komunajn problemojn en E-instruado. Mi estis prezidanto de LKK de la 45-a ILEI-konferenco en Kunming. Ĝuste en tiu ĉi jaro, 2012, mi estraraniĝis en ILEI, kaj en 2013 oni elektis min kiel la duan vicprezidanton; en 2015, mi estis reelektita kiel la sola vicprezidanto. En 2018 mia mandato finiĝis. Mi pensas, ke gravas disvolvi la Esperanto-movadon, havi plurpartian kunlaboron kaj fari (inter)naciajn aktivaĵojn.



**Sekvu kaj abonu
la Gazetarajn
Komunikojn de UEA
por informiĝi pri
freŝaj novaĵoj ĉe:**

**[https://uea.org/
aktuale/komunikoj](https://uea.org/aktuale/komunikoj)**

Rezultoj de la UEA-enketilo: 2^a raporto de Duncan Charters, Prezidanto de UEA

95% de la membroj trovas kompreneblaj kaj utilaj la kvar kolonojn proponitajn por nia strategia planado, KIRI. Jen, kun aldonaj klarigaj notoj: **Kunlaborado** (interna, prepare al pli efika ekstera), **Informado** (kun ĝenerala plibonigo de komunikado), **Rilatoj** (kun la ekstera mondo), **Instruado** (kaj lernado de Esperanto).

Kvankam nature interrilatas tiuj kvar kampoj, ni petis ke la membroj de UEA elektu prioritato unu el ili por sia individua agadfokuso. Malpli ol 15% indikis ne-kapablon aŭ ne-interesiĝon kontribui. Jen la rezultoj, laŭ ordo de prioritato:

1. Instruado/lernado (ebligo de lernado de la lingvo por k.e.p. multaj personoj): 208 membroj, 33%.

2. Informado (informkampanjoj, diskonigo de Esperanto en ĉiuj eblaj medioj): 183 membroj, 30%.

3. Rilatoj kun la ekstera mondo (proponi servojn, rilati kun UN, Unesko, aliaj): 79 membroj, 13%.

4. Kunlaborado (konfliktsolvado, harmoniigaj rilatoj por pli efika interna laboro): 57 membroj, 9%.

75% de la membroj elektis tre konkretan agadon. Interesas la ordo de prioritatoj de la favore elektitaj agadkampoj, el kiuj evidente instruado kaj informado estas la plej popularaj:

1. Ricevi trejnadon por pli efika instruado de la lingvo kaj kultura kunteksto: 66 membroj.

Ni evidente prioritatigu trejnadon de niaj membroj por pli efika instruado en Esperantaj kursoj.

2. Helpi teni alireblaj ĉiam pli da rimedoj por memlernado de la lingvo: 55 membroj.

Tio respondas al la fakto ke ĉiam pli da novaj esperantistoj memlernas, do ni plikreskigu la diversecon de elektebloj por tion fari.

3. Labori en grupo kiu subtenas verkadon de interesaj informartikoloj: 51 membroj.

Tio spegulas realon ke kiam ni disponigas al la amaskomunikiloj interesan materialon, ni povas atendi pli bonan sukceson pri ĝia akcepto.

4. Partopreni en trejnado pri komunikado kun amaskomunikiloj: 50 membroj.

Simila nombro rekonas ke kaj la materialo kaj la kontaktoj estu bone preparitaj por atingi efikajn rezultojn.

5. Labori en internaciaj kampanjoj kiel la "Tago de Esperanto": 44 membroj.

Ni bezonas pli da homfortoj por niaj jamaj kampanjoj, ekzemple en Eŭropo, kaj se ni atingu agnoskon de UN kaj Unesko, tio bezonos laŭcelan, konsekvencan planadon kaj prizorgon.

6. Membriĝi kaj aktive partopreni en la agado de loka internaciema grupo: 38 membroj.

Ni dividu spertojn pri sukcesa partopreno en tiaj grupoj, kun la celo prepari gvidilon por efika kunlaborado kaj informadago.

7. Proponi helpon al ILEI por kiu ajn necesa subteno al la laboro de la Ligo: 38 membroj.

ILEI kiel ĉefa organizita grupo celanta la antaŭenigon de instruado de Esperanto en lernejoj kaj aliloke bezonas nian

vastan subtenon por atingi niajn komunajn edukajn celojn.

8. Partopreni en komisiono kiu celas vastan instruadon de E-o en lernejoj: 38 membroj.

Tio povus esti la plej grava grupo por certigi la pli ĝeneralan akcepton kaj uzadon de Esperanto kiel preparlingvo por lernado de aliaj lingvoj kaj interkulturaj spertoj inter lernejoj de la mondo.

9. Labori en grupo kiu celas tuj respondi al publikaj mencioj pri Esperanto: 38 membroj.

Ĉi-jare tute hazarde universitata kolego atentigis min pri artikolo en usona intelektista reta revuo, de konata fakulo kiu ofte aludis al Esperanto pli negative ol pozitive. Necesis respondo, sed ni ne havis sistemon por rutine informiĝi pri tiaj artikoloj kaj trovi taŭge preparitajn respondantojn.

10. Doni trejnadon por pli efika instruado de la lingvo kaj kultura kunteksto: 36 membroj.

Estas tre kuraĝige ke 36 membroj sentas sin kapablaj tion liveri kaj pretas kunlabori tiucele. Laŭ respondoj al la unua punkto, ni jam havas 66 membrojn kiuj deziras profiti de tia trejnado!

Por ĉiuj aliaj ebloj, ni havas minimume 8 kunlaborantojn, do ni povas progresi eĉ pri jenaj celoj:

proponi post trejniĝo kaj sperto trejnadon pri interkultura kompetento al aliaj grupoj, vera servo kiun ni povas oferti, sed por kiu ni tute ne estas preparitaj ĝis nun; volontula servado en internaj komisionoj, kiel reviziado de la statuto (ho, dankon, tio delonge estas bezonata, nun ankaŭ por konformiĝi kun novaj nederlandaj leĝoj, reguloj kaj rekomendoj); atento al konfliktemaj in-

dividuoj por helpi ilin pozitive kontribui (ankaŭ bezonata talento, ĉar tiaj personaj ofte estas tre dediĉitaj al niaj idealoj kaj ne deziras malhelpi progreson). Necesos tempo por organizi komisionojn kaj laborgrupojn por ĉiu dezirata agado, sed ni havos la homfortojn se ĉiu membro sin dediĉas al unu el ili. Gravas ankaŭ kunlaborigi volontajn nemembrojn kiuj pretas kontribui, ĉar tiuj ekzistas, kun rekomendo membriĝi sed sen devigo se ili preferas kunlabori de ekster niaj rangoj. UEA ne intencas diskriminacii kontraŭ nemembroj kiuj tamen amas Esperanton kaj deziras kunlabori por ĝin progresigi.

96 individuoj deziras specife kontribui al UEA aŭ per volontula laboro pri difinitaj taskoj aŭ per laboro kun honorario. Ni nun pritaksas la bezonojn kaj la talentojn de tiuj individuoj kiuj jam proponis sin, ĉar ni havas nun la eblon uzi la kontribuojn de membroj en kiu ajn parto de la mondo per la nunaj retkonektoj. En iuj kazoj estos limigoj, ekzemple se ni ricevas administran subvencion de Eŭropa Unio kiu postulas Eŭropajn dungitojn, sed alioke ni ne plu limiĝas al oficejaj laborantoj en Nederlando, kaj ni profitu tiun nuntempan avantaĝon.

65 membroj respondis pozitive al: "Interne de la movado, mi pretas kunlabori en kampanjoj por financi pli vastan agadon de UEA, inkluzive stipendiojn kaj subvenciadon de agado, rilatojn kun eventualaj mecenatoj, entreprenojn profitdonajn al UEA." Tiu kategorio inkluzivas diversspecajn agadojn por financi pli vastan agadon de UEA, pro tio tiu nivelo de kunlaborado estos tre bonvena, aparte pri la lasta ni malmulton faris ĝis nun.

Interesas la respondoj al la demando "Kiel vi priskribus UEA?". "Internacia" plej ofte vidiĝas, tute kompreneble, kaj "tutmonda" ("tutmondeco"), "mondskala" k.s. sekvas, kun "Universal(ec)a". Plejoftaj respondoj estas tute pozitivaj: "esenca, necesa (multaj, kun variantoj "nepre necesas" k.a.), bezonata, grava, utila, interesa, neŭtrala, amikema, inkluziva, kunordiga, kunlaborema, entuziasma, komunika, milda, serioza, bona, fidela, lerteca, kunideala, efika, forta, unueca, potenciala, paca, valora, heroa, nia; komunumo, granda familio, servo, kompetenteco, soli-

dareco, respondeco, klopodo, frateco, kompatio, amo, interkompreniĝo (lingva kaj kultura), lernado, volontula agado, mirinda laboro". Spegulas la delonge konatan funkciadon de UEA "movado, kongreso, instiganto, disvastigo, unuigo, estonteco, reprezentado, centra, tradicia, tegmenta, institucia, stabila, laborema, informas". Kritikaj priskriboj inkluzivas kelkajn kun variantoj de "malnova", "malmoderna", "malnovstila". Ne mankas humuro: "Esperantista klubego", "mortanta (bonvolu ne aldoni tion al la vortonubo!)"; kaj por ne kaŝi aliajn individuajn negativajn, aperas "modernigebla, enua, desupra, rigida, malforta, arkaika, kadukiĝanta, maljunulara, fora, abstrakta; burokratio, elitismo, eŭrocentrismo, rego, dekadenco, malprogreso, krizo, prisilento, introspekto"; pri agado, "forvaporigis", "rezigninta pri sia tasko", "pigra", "malaktiva", "dormanta" kaj aldona frazo: "tradormo de ŝancoj en la 21-a jarcento". Ĉu mi ĵus refutis la kritikon ke "neniam aperas io negativa en la organoj de UEA"?!

Tiuj negativaj estas individuaj, ne grupaj, tamen gravas ĉar ili troviĝas en la perspektivoj pri la ĝenerala imagbildo de UEA, kaj tiuj perdos sian efikon nur se ni sukcesos klare demonstri agojn kiuj specife kontraŭdiras tiujn impresojn. Tio estas parto de la tasko de UEA, por ke la Asocio publike prezentiĝu sen pridubigoj pri la sincereco, esenca bazo de ĝia agado, kaj jes, ĝenerala progreso, eĉ sukceso en siaj planado kaj atingoj.

Multe pli pezas tamen la pozitivaj respondoj al la agado de nia Asocio. 45% de la respondintoj en la elekta sekcio de la enketilo decidis respondi al la demando: "Kion vi plej ŝatas pri UEA?". Mi finos resumante reprezentajn respondojn de niaj membroj. En la decembra numero, mi atentis la respondojn de la ne-membroj de UEA, kun kelkaj ĝeneralaj konkludoj ankaŭ pri la ĝisnunaj mankoj, kaj la efikon kiun havas kaj tiuj kaj niaj lastatempaj sukcesoj en la strategiaj agadplanoj interne kaj ekstere de UEA.

Kion vi plej ŝatas pri UEA?

• Vera internacieco, stabila akso de la movado, trafe reprezentbla al eksteraj organizaĵoj.

• Malgraŭ ĉiuj defioj kaj malfacilaĵoj, ĝi plu ekzistas kaj plenumas kion la membroj intencas.

• La fakto ke ĝi ekzistas kiel plej grava internacia Asocio por Esperanto, kaj estas plibonigebla.

• Se UEA ne ekzistus, la movado por enkonduki Esperanton ne kapablus progresi.

• Fidela agado kaj informado por ke la publiko havu pli pozitivan impreson pri Esperanto.

• La sindediĉaj homoj kiuj senlace laboras en ĝi: harmonie laboras kun tre kapablaj estraranoj.

• La servoj: elstaras la Delegita Reto, Libro servo, Eventa Servo, UK, IKU, VK, Revuo *Esperanto*.

• Per ĝiaj diversaj retoj mi povas kontakti specifajn homojn en pli ol 100 ŝtatoj de la mondo.

• Nobla idealo faciliganta Interhoman komunikadon kaj amikojn tra la tuta mondo.

• En unu loko, oni trovas ĉion necesan por Esperanto: librojn, informojn, reklamilojn ktp.

• UEA relative bone reagas al ŝanĝiĝanta mondo, kaj subtenas la junularon kaj *Kontakto*-n.

• Grandparte la kohereco de Esperanto en nuntempo estas danke al UEA.

• Nur per kunigado de fortoj ni kapablos disvastigi Esperanton. Por tio necesas UEA.

• UEA estas lumturo de la mondo por informi kaj organizi la geesperantistojn.

• UEA ekzistas por defendi la valoron de universala komunikado por paca solvado de konfliktoj.

• UEA superstaras naciajn kvirelojn kaj de tie povas akcenti homajn rajtojn, aparte la lingvajn.

• Pli definitive!: "UEA estas la ĉefa, plej taŭga ilo por kunigi la mondhomaron por plibonigi la homan bonfarton kaj alproksimiĝi al mondpaco". "Se ĝi ne ekzistus, mi kunfondus ĝin".

Kaj fine (kun danko ĉar ĝi spegulas la intencon kaj esperatan rezulton):

• "Mi plej ŝatas ĉi tiun enketon, ĉar ĝi montras bonan kaj efikan komencan por pli bona organizado ne nur por, sed ankaŭ kun siaj membroj".



Furoraĵoj de la kongresa libroservo en Torino

■ Ionel Onet

Ĉi-sube estas listigitaj la titoloj el kiuj vendiĝis pli ol 10 ekzempleroj. La indikitaj prezoj estas tiuj aplikitaj dum la kongreso. Ĉi-jare dum la kongresa libroservo vendiĝis varoj sume de 24 755 €.

Ekz.	Titolo	Prezo (€)
86	<i>Poŝamiko</i> (B. Allée & K. Kováts)	4,60
73	<i>IKU-libro 2023</i> (Red. A. Striganova, D. Ševčenko, A. Wandel)	18,35
20	<i>Detala gramatiko de Esperanto</i> (B. Wennergren)	13,75
20	<i>Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon</i> (W. Holzwarth / W. Erlbruch)	12,65

Ekz.	Titolo	Prezo (€)
15	<i>Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj</i> (A. Madella)	22,00
15	<i>La okulvitroj de Lidia</i> (A. Arana)	19,25
14	<i>Konfuziloj</i> (P. Wierzbowski)	13,20
13	<i>Tamen kantas fido</i> (C. Bicknell)	15,15
13	<i>Esperanta frazeologio kaj proverbaro plene klarigita</i> (P. Desmet')	14,85



Revoj de infanoj


■ Laure Patas d'Ilhers

Julian Modest, *La fluganta akrobato*, 46 p. Eldonejo Libera, s.l., 2023. Prezo ĉe UEA: 7,50 €

Kiam vi estis infano, pri kio vi revis? Rememoru! Mi ne kapablas nomi ĉiujn temojn pri kiuj vi revis, sed pri iu el ili mi certas: vi iam revis flugi. Ĉiuj infanoj, rigardante la birdojn super sia kapo, revas flugi kiel ili kaj ĝui plenan liberecon en la senlima ĉielo. Ne nur la infanoj revas flugi. Fakte, flugi estas revo de la homaro ekde la praepoko.

Pli ĝenerale, homoj emas revi pri superhomaj kapabloj: kiel agrablus la vivo, se oni estus fortega, aŭ fulmrapida, aŭ povus fariĝi nevidebla, kaj tiel plu. Tiaj revoj instigas la kreadon de amaso da bildstrioj, filmoj, romanoj, pri la tiel nomataj superherooj. Iu el tiaj revitaj povoj estas la kapablo travidi aŭ trapasi murojn. Ekde kiam la homaro komencis loĝi en konstruaĵoj kun muroj kaj fermitaj pordoj, oni revas trapasi ilin. Tiu temo estis pritraktita ekzemple en *Le passe-murailles*, novelo

verkita en la franca de Marcel Aymé, kies unuan parton Louis Beaucaire tradukis sub la titolo *La murtrapasulo*. En la novelo la heroo fariĝas rabisto, ĉar por li facilas ŝtelo.



Ĉi tiu artikolo ne temas pri la malnova novelo de Marcel Aymé, sed pri tutnova Esperanta libro, titolita *La flu-*

ganta akrobato. Ĝi enhavas du sendependajn rakontojn: la unua temas pri heroo kiu kapablas flugi, en la dua la heroo kapablas trapasi murojn.

La rakontoj kompreneble estas iom fantastaj. Ili okazas dum epoko probable pasinta. Ĉiu el la du herooj estas knabo, akompanata de fascinita knabino.

La unua rakonto enhavas 19 paĝojn kaj la dua – 14. Entute la libro estas 47-paĝa. La libro celas infanan legantaron, aŭ komencantojn. La lingvaĵo estas simpla, la frazoj mallongaj. La situacioj kaj eventoj facile kompreneblas. La sentoj estas delikate priskribitaj.

La aŭtoro de *La fluganta akrobato* estas Julian Modest. En la mondo de Esperanto, ĉiuj konas Julian Modest. Li estas membro de la Akademio de Esperanto. Li verkas originalajn librojn ekde 1983. *La fluganta akrobato*, kiu ĵus publikigis, estas la lasta el liaj 30 libroj. Inter la verkoj de Julian Modest troveblas diverstipaj libroj: romanoj, teatraĵoj, eseoj, noveloj, krimromanoj, romanoj por adoleskantoj, infanlibroj. Liaj infanlibroj estas simplaj kaj plenaj je poezia etoso.

La fluganta akrobato povos fariĝi plezura donaco al infano dum la venontaj jarfinaj festoj. Ĝi revigos la infanajn legantojn, eble ankaŭ la plenkreskulajn.

Letero de leganto | Lingvo

Interpretante Globalizitan* Mondon – gravaj argumentoj por subteni esperantistojn

* neologisma vorto kun la signifo "Tutmondiĝintan"

■ Roberto Resende

Dum multaj jaroj, mi dediĉis min al la informado pri Esperanto, ĉar mi estas konvinkita, ke Esperanto ne havas la prestiĝon kiun ĉiuj ni revas, ĉar la plejmulto de la homaro aŭ ne aŭdis pri ĝi aŭ estas misinformita pri la celoj de la Internacia Lingvo.

Esperantistoj neglektas ĉiujn inform-konsilojn de la Principaro de Fros-tavallen, la Gvidliniojn por Informado (UEA) kaj same la inform- kaj propa-gand-normojn fare de Zamenhof mem.



Mi ĵus spektis intervjuojn kun gravaj interpretistoj, kaj notis kelkajn ciferojn, kiujn mi juĝas gravaj subtenoj por la esperantista argumentado.

Do, mi decidis skribi al la UEA-revuoj!

Malgraŭ tio ke oni uzas kiel sinonimojn la vortojn *traduki* kaj *interpreti*, fake kaj fakte ili ne estas la samo. *Traduki* estas pli skriba, kun la helpo de vortaroj, enciklopedioj ks. *Interpreti* estas pli parola, kiam oni interpretas ne nur la vortojn, sed ankaŭ nuancojn, sentojn, intencojn kaj kulturajn malsimilaĵojn. Estas bone reaserti, ke ĉi tiun lastan komputilojn ne povas bone fari. Do, ĝi devas esti farata de homoj!

traduk/i (tr) Transigi iun tekston aŭ konversacion de unu lingvo en ali-

an, anstataŭigante vortojn k esprimejojn de la unua lingvo per samsencaj vortoj aŭ esprimejo de la alia (PIV, 2020)

interpret/i (tr) Atribui difinitan sencan al io, k sekve

1 Traduki parole al fremdulo ion el lingvo de li nekomprenebla; 2 Klarigi ion dubsencan k malfacile komprenebla; 3 Elmeti la internan sencan, intencan de artisto per ĝusta prezentaĵo, ludado ks (PIV, 2020)

La ĉefo de la Interpret-Servo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), s-ro Hossam Fahr, asertas ke “*multlingvismo devas esti respektata kaj konservata. Lingvo estas io, kio rilatas al identeco, kio rilatas al heredaĵo, kio*

rilatas al kultura etoso, kio rilatas al la demokratia naturo de la institucioj.”

Se nur homoj povas fari fidindan interpretadon, de tio venas la neceso dungi interpretistojn fare de organizaĵoj, ĉefe la multnaciaj organizaĵoj.

En Eŭropa Parlamento (EP) ĉiuj membroj rajtas paroli en siaj propraj lingvoj. Nu, tio signifas ke oni uzas la 23(24) oficialajn lingvojn, de kio rezultas 506 traduk-kombinoj. Ili ne povas uzi, kiel antaŭe planite, la 5 (6) laborlingvojn: la anglan, francan, hispanan, rusan, ĉinan, (araban).

Dum semajno kun multe da laboro en Eŭropa Parlamento povas esti

100 kunvenoj (kelkfoje eĉ pli). Por povi trakti tion, E.P. havas 308 dungitajn interpretistojn, voluntulojn, kaj devas pagi nedungitajn interpretistojn.

Estas ĉiam bone memori (kaj memorigi al la institucioj) pri la propono, ke Esperanto estu la nura lingvo de Ligo de la Nacioj (prapatro de UN), kaj ke Esperanto povas esti unu el la labor-lingvoj kaj de UN kaj de Eŭropa Parlamento. Same validas la ideo de DLT (Distribuita Lingva Traduko), en kiu la dokumentoj estu arkivitaj en Esperanto, kaj nur kaze de neceso iu estu tradukita en la cel-lingvon. Ni ne lasu tiujn ĉi ideojn mort!

Kulturo | Universala Kongreso



Unua ZEO* en Montrealo

■ Normando Fleury, prezidinto de LKK, 107-a UK en 2022

Ekde la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, ni provas havi ZEO-n en Montrealo. Ni proponis diversajn parkojn kaj stratojn. La toponomia instanco montreala foje indikis ke ili aldonis la nomon Esperanto en la nombankon, por eventuala uzo. Poste, ili informis nin ke ili ne intencas uzi tiun nomon ĉar ĝi ne sufiĉe rilatas al la historio de la urbo. Ni refoje petis kun pli detala dosiero. Sed vane, ĉiam estis negativa respondo.

Esplorante pri la pioniroj de la movado en Kebekio, cele la nomadon de salonoj por la 107-a UK, mi aparte interesiĝis pri la vivo de Albert Saint-Martin. Estas parko kaj ekstera murbildo je lia honoro en Montrealo. Nu, li gravas en la historio de Montrealo kaj estis pioniro en la Esperanto-movado. Kial ne ligi la du cirkonstancojn? Mi eksciis ke estas biografia libro pri li kaj tuj mendis ĝin. Mi malkovris ke Saint-Martin dediĉis sian vivon al disvastigo de Esperanto, iris al la unua UK en Bolonjo, fondis Esperanto-revuon *La Lumo*, la unuan Esperanto-klubon kaj multe pli.

Okaze de la UK montreala, mi proponis al la urbaj instancoj, honorigon de Saint-Martin per memortabulo. Estis longega procezo kaj fine ni sukcesis pasint-septembre, publike malkovri la tabulon. Ni celis ke ĝi ne nur honorigu Saint-Martin, sed ankaŭ menciu la okazigon de la UK en Montrealo. Tion ni ne klare menciis al la urbestro, sed ĝi estis nia sekreta kromcelo.

Estis televida elsendo kaj longa reta artikolo pri la evento.

Ni fieras ke fine estas la unua ZEO en Montrealo.

*ZEO = Zamenhof-Esperanto-Objekto

INK – pli ol konkurso: Esperanto kiel ponto-lingvo

■ Stela Besenyei-Merger

Ĉu vi jam provis paroli Esperanton al persono pri kiu vi preskaŭ certis, ke tiu ne parolas ĝin? Ekzemple vi trovis vin en stacidomo, en lando kies lingvon vi ne parolas, kie vi certis, ke via denaska lingvo plej verŝajne ne funkcios, do anstataŭ ne paroli kaj nur signi per la manoj vi instinkte ekparolis en Esperanto por helpi vian situacion? Kaj ĉu oni komprenis vin? Plej verŝajne post iom da kapskuado jes, vi ricevis helpon, kaj trovis la ĝustan kajon. Kiel tio rilatas al novelo-konkurso kies celo estas interkultureco? Mi rakontos al vi nun.

Mi supozas, ke la nomo INK sonas konata al vi, ĉar vi legas tiun ĉi gazeton, kiu enhavas alvokojn pri ĝi. Ankaŭ tio povas esti ke vi partoprenis unu el la pasintaj du Universalaj Kongresoj kaj vi trovis la INK-novelon kiel donacon en via sako. Vi eble nur post via reveno hejmen pli bone rigardis, pri kio entute temas tiuj libroj. Eble vi aŭdis pri Bobelarto, verkesejoj kaj legosalonoj, pri aktivaj organizitaj specife por subteni verkemon en Esperanto kaj kune legi ekzistantan literaturon, sed vi ĝis nun ne ligis tiujn apartajn aktivajn al INK.

Kiel la nomo sugestas, la celo de la konkurso estas stimuli verkadon de noveloj, interkulturecon, aldone subteno de originala Esperanto-literaturo, transdonado de premioj al la brilaj (novaj) verkistoj kaj eldonado de libro kun abundo de legindaj noveloj. Tiuj multaj celoj interplektiĝas, do mi detale rakontos kiel kaj kion ni faras.

Por ricevi diversajn perspektivojn el diversaj kulturoj Esperanto estas brila lingvo, en si mem io ajn Esperanta sugestas interkulturecon kaj vi ankaŭ certe havas multe da belaj (kaj amuzaj!) spertoj rilate al tio. La konscia



elekto de la nomo INK celas klaran mesaĝon al ankaŭ ekster Esperantujo. La vorto *inko* jam estas taŭga vorto por celi skribadon, do la ligo estas rapida al verkado. Ni diru tiel: la ‘vera’ interkultureco por signi al la ekstera publiko ekaperis kiam ni aldonis la unuan lingvon ekster Esperanto por povi konkurssi. Subite homoj, kiuj antaŭe ne interagis per io ajn Esperanta, trovis nian retejon kaj engaĝiĝis iusence senkonscie al la komunumo.

Tamen, unue ni iru reen al la komencoj por kompreni la radikojn de la ideo. Kanadaj literaturaj entuziasmoj ekhavis la emon organizi verkmaraton dum la UK en Montrealo. Sed por

la deviga prokrastado de la renkontiĝo la ideo evoluis al novelo-konkurso kiel artoplana atendado, ĝis la kongreso fakte povis okazi. La temo de la unua eldono estis konvena: kiel KOVIM-19 ŝanĝis nian vivon? Tiam la interkultura parto ĉefe signifis, ke partoprenantoj povis verki en ajna lingvo, kondiĉe, ke traduko en Esperanto estis alkroĉita al la originalo. Aldone ankaŭ la Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj UEA jam de la komenco subtenas tiun instigon je internacia kunlaboro. Estis bona komenco por sukcesa konkurso. La demando tamen leviĝis: kie(l) trovi la plej bonajn novelojn? Kiel verki intereson pri nova literatura kon-

kurso? Peti homojn verki kiuj tion jam mem faras de longa tempo, estas unu maniero. Sed kiel helpi homojn *ekverki*, kaj kiel ĝenerale pliboniĝi pri verkado por ricevi publikigindajn novelojn?

Multaj Esperanto-kluboj komencis retajn kunvenojn dum la hejmmrestaj pandemiaj tempoj. Post tiuj sesioj de diversaj invitoj en ĉefe naciaj kluboj ekestis Bobelarto. Spaco por esti en artaj bobeloj en la reto. Efemera kiel veziko. Ni konstatis ke por konstrui komunumon oni bezonas regule renkontiĝi en la reto. Tiel naskiĝis la sabataj literaturaj sesioj en aŭgusto 2021.

Dumtempe ni lanĉis la duan eldonon en februaro 2022 kun la temo "Nokta vojaĝo", inspirita de la albumo de Yves Desrosiers *Nokta ŝoforo*. Unue ni aldonis unu lingvon al la konkurso, la italan, por reprezenti la landon de la Universala Kongreso en Torino. Nur kelkajn semajnojn post la lanĉo eksplodis la milito en Ukrainio, kaj ni decidis modifi la konkurson per du novaj lingvoj: la rusa kaj la ukraina, kun la espero, ke la temo permesos esprimi la sentojn de la tempo. Kiel ĉiu alvenanta novelo montras spegulon al la epoko mem en kiu ni vivas. Ni ricevis 421 novelojn, kaj jes, pluraj priskribis scenojn de milito, kelkaj eĉ aperis en la dua novelaro: *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*.

Alia celo de la konkurso estas inviti (ankoraŭ) ne-Esperanto-parolantajn

verkistojn kiel honorajn prezidantojn de la konkurso. Se komunumo havas aktivajn verkistojn, tio montras, ke la lingva komunumo ja viglas. Aldone pro la engaĝiĝo de pluraj oficialaj instancoj (UEA kaj ALE), la prezidantoj tuj komprenas, ke la lingvo estas uzata kaj parolata tutmonde.

Ili kontribuas per enkondukaj vortoj kaj novelo al la novelaroj, kaj povas vidi tradukon de sia verko en Esperanto tiel. La unuan eldonon prezidis Claudia Larochelle, kebekia verkisto – elekto estis pro la montreala UK –, la duan Paola Cereda, itala verkisto el Torino, la trian Jordi Solé i Camardons el Katalunio pro la nove aldonita lingvo, la kataluna. Vi povas demandi vin: kial ĝuste la kataluna? Ni elektis ĝin por doni okazon al minoritata lingvo kiu havas viglan literaturon, riĉigi la rikolton.

La prezidantojn de la konkurso ni elektas el la Esperanto-komunono: ĝis nun Franciskon Lorrain, Bruĉjon Casini kaj Nicolau Dols. Kaze de dubo pri la gajnintoj, la fina voĉo iras al la prezidanto.

Parolante pri la tria eldono mi menciis, ke la alia aldonita lingvo krom la kataluna estas la persa. Ni volis elekti lingvon ĉefe parolatan en Azio sekve en la listo, kaj la kvara eldono de la konkurso emfazos tiun elekton ankaŭ per la du sekvaj prezidantoj.

Memkompreneble la aldono de diversaj lingvoj donas unikan ŝancon ankaŭ al la verkistoj kiuj esprimas sin originale en Esperanto. Povi montri siajn lingvajn kapablojn fortigas la meriton de Esperanto kiel literatura lingvo por konkursi kontraŭ ĉiu alia lingvo. Ke planlingvo kapablas atingi tiun nivelon mi ne nepre devas klarigi al la legantoj de revuo en Esperanto, simple reaserti la gravecon de tio.

Verkante la artikolon, ni ĵus fermis la sendof formularon de la tria eldono kun la temo "la sekreta vivo de miaj najbaroj". Ĝis la 30-a de septembro INK ricevis ĉ. 1350 konkursaĵojn. Tiu alta cifero ne estas nur pro la fakto, ke pli multaj lingvoj akceptatas ol antaŭe. Ni aktive varbas por la konkurso en nacilingvaj retejoj krom la Esperantaj gazetoj kaj diversaj renkontiĝoj.

Ni petas helpojn de amikoj kiuj parolas la lingvojn denaske, kaj ili tro-

Grupo de Bobelarto-partoprenantoj de la verkekskurso kiun ni organizis en Torino



vas la taŭgajn literaturajn retejojn por diskonigi INK. Novaj kaj ankaŭ spertaj, – ofte nacie famaj – verkistoj rapide ekkomprenas, ke la konkurso kun altaj monpremioj – tio ja ankaŭ montras la seriozecon de la afero – kaj kun publikigo de la finalistoj en novelaro estas partopreninda evento.

Multe da noveloj alvenas, do vi povas imagi, ke ni devas komuniki kun multe da konkursantoj. Kompreneble se temas pri la plej oficialaj partoj de la konkurso, kiel la retejo aŭ la sendado de kontrakto, oficialaj rezultoj, tiam ni uzas la denaskan lingvon de la partoprenanto. Aŭ pli precize: la lingvon en kiu la persono sendis la konkursaĵon.

Sed se temas pri simplaj demandoj, konfirmoj pri ricevado de la novelo, tiam ni respondas en Esperanto. Mi supozas, ke unue ili rigardas la ekranon kvazaŭ okazintus eraro, sed poste pluraj simple respondas en sia nacia lingvo, kaj klare komprenas kion ni mesaĝis. Mi mem uzas Guglo-tradukilon por kompreni la petojn kaj tiel la komunikado okazas. Ofte, videble ili mem kopias la respondon en Esperanto de la reto, kaj kelkfoje okazas amuzaj mistradukoj, sed ĉio restas komprenebla kaj bone komunikita.



Rafa estas gajnanto de INK (foto de François Bolduc)



Kiam la libroj alvenis al Torino antaŭ ol ili eniris la kongresajn sakojn (foto de Petro Balaz)

Ĝis nun nur dufoje okazis insisto uzi la anglan aŭ la italan anstataŭ Es-

peranto, pluraj konkursantoj strebas respondi en Esperanto, skribas simple "dankon" aŭ eĉ rakontas pri siaj intertempaj malkovroj pri la lingvo. Ĉar la libron minimume en bita formato ĉiu konkursanto ricevas, ili povas eĉ pli bone malkovri la lingvon, ĉefe se ankaŭ iliaj noveloj aperis en la novelaro. Do tiel ni milde varbas por Esperanto, uzante literaturon kaj eĉ komunikas senbride kun la partoprenantoj. La reagoj estas tre pozitivaj ĝis nun. Pluraj aludas al ekinteresiĝo aŭ eĉ eklernado de la lingvo.

Do nun, vidante iom malantaŭ la kulisoj de INK, espereble post la somero vi remalfermos vian kongresan sakon kaj malkovros tiun bluan libron kiu estis en ĝi. Kaj se vi ĝis nun ne havas ĝin, eble vi mendas en la UEA-libroservo, aŭ se vi volonte ricevus la bitan version kiel la konkursantoj: tiam iru al bobelarto.ink kaj abonu nian novaĵleteron aŭ sendu mesaĝon al ni.



Pri sukero, katoj kaj mondo de plej diversaj noveloj

■ Anna Striganova

Mi ricevis inviton iĝi unu el la ĵurianoj de la INK-konkurso antaŭ la UK en Montrealo. Tiu, kiu poste ne okazis, sed estis prokrastita. Tiam INK ankoraŭ naskiĝadis, eĉ temo ne estis anoncita. Unue mi ekmeditis: mi neniam estis ĵuriano de iaj konkursoj, ĉu mi sukcesos esti justa, ĉu mi estas sufiĉe sperta por tiu estimata rolo kun tia belsona nomo – ĵuriano de literatura konkurso! Nu... certe mi konsentis, tuj! Poste venis Kovim kaj iĝis interalie temo de la unua INK-konkurso. Mi ektimis: Kovimo kun sia timiga kaj morna enfermiĝo regis la mondon, kaj nun mi devos renkonti ĝin ankaŭ en literatura formo, en dekoj da rakontoj, certe mornaj kaj senesperaj. Sed, ricevinte la kameron kun konkursantaj noveloj, mi tuj komprenis, ke mi eraris. La rakontaro ne igis la ombrojn kolektiĝi ĉirkaŭ mi, sed helpadis al mi ilin forpeli. Ne timo kaj ne malsano okupis la ĉefan lokon en la rakontoj, sed miloj da manieroj ilin travivi, ilin superi kaj resti homo. Jen la sekreta kuirrecepto de saŭco de

forpasinta avo helpas reamikiĝi al la familio kaj eĉ denove eklerni aŭdi la voĉon de malnova domo. Jen knabino kun bonega humursento trovas sian amon per Amikumu kaj, vi ne kredos, ilia renkontiĝo ne eblus sen kvarantena enfermiĝo! Kaj jen *postkovima* estonteco, kie por eviti novajn virusojn oni malpermesas al homoj brakumi unu la alian kaj ankaŭ manĝi sukron! M neniam ŝatis sukron, sed post tralego mi ĉiam metas ĝin sur videblan lokon en mia hejmo, kiel simbolon :) Ho, per la tuta mia animo mi deziris, ke tiu rakonto pri brakumoj aperu inter la venkantoj. Kaj ĝi ja aperis!

Do, INK tuj iĝis grava parto de mia vivo. Estis ege interese diveni de kiu lando estas la aŭtoro, kiom aĝa, kaj eble eĉ la aŭtoro estas iu mia konato? Pri la landoj, interalie, mi ofte trafis. Pri ĉio alia, ve, neniam! Estis interese por mi, kiel la aŭtoroj, eĉ perfekte verkantaj en Esperanto, per io apenaŭ sentebla malkovras sian devenon aŭ sian gepatran lingvon!

Mi ankaŭ maltrankvilis, ĉu entute eblos elekti gajnantojn en tia bunteco,

ja verŝajne ĉiu el ni voĉdonos pri io persone proksima: ĉu pri fantazia rakonto, aŭ pri detektiva, aŭ pri rakonto verkita kvazaŭ de hejma kato... Sed tute ne atendite ni ĉiuj voĉdonis sufiĉe simile. Kaj ricevinte la rezultojn mi sentis varman kunsenton kun la aliaj ĵurianoj, parte eĉ ne konataj por mi. La kvinopo de verkintoj estis brila, kiel mi ĝuis!

Sekvantjare aperis du novaj defioj. Unue, la kvanto da rakontoj lavange ekkreskis. Due, aperis noveloj, tradukitaj en Esperanton. Sed la vojo estis jam konata kaj la temo tiel enigme agrabla – "nokta vojaĝo"! Ĉi-foje estis pli da profesie verkitaj noveloj, do elekto vastis. Mi kun plezuro rimarkis, ke sufiĉe grandan kvanton da rakontoj mi legas kun la sento, ke inter miaj okuloj estas ne konkursantaj noveloj, sed freŝaj, originalaj klasikajoj. Estis ankaŭ konataj vizaĝoj, eĉ ne vizaĝoj, sed muzeletoj, novaj rakontoj verkitaj kvazaŭ de hejmaj katoj! Sendepende de la temo, kataj rakontoj nekredible multas, indus eldoni apartan libreton *INK, okupita de katoj, ron-ron*. Mi bone memoras, kiel vintre mi kun infaneca dolĉa senpacieneco atendis du aferojn: la Novjarajn-

Kristnaskajn festojn kaj la rezultojn de nia INK-voĉdonado. Kaj kiam mi ekvidis sur la ekrano de mia komputilo, kun aro da aliaj mesaĝoj, mesaĝon de Stela kun la rezultoj, ĝi ŝajnis al mi kovrita per

kolora papero kaj ĉirkaŭligita per ruĝa rubando! Kaj similaspekte venis al mi invito trian fojon iĝi INK-ĵuriano. Ek al novaj aventuroj, ĉi-foje renkonte al enigmaj najbaroj kaj novaj katoj certe!

P.S. Antaŭ kelkaj tagoj, venkinte obstinajn barojn de novaj poŝtaj reguloj, min finfine atingis la presitaj versioj de ambaŭ novelaroj, kiujn mi plezure montros al miaj Esperanto-lernantoj!

Komisiono de UEA por agado en Eŭropo

Kiom da armeaj grupoj havas la papo? Kaj kiom da eŭropaj esperantistoj havas Eŭropa Esperanto-Unio?

■ Renato Corsetti,
Pierre Dieumegard,
Seán Ó Riain

Al konsilanto, kiu konsilis al Stalin atenti pri la morala influo de la papo dum la Dua mondmilito, Stalin respondis: “Sed kiom da armeaj grupoj havas la papo?”. Certe vi pensos, ke tiu estis Stalin dum la milito, sed bonvolu konsideri, ke ĉiuj regantoj rezonas same, ankaŭ en nia amata Eŭropa Unio. Do, malgraŭ tio, ke ĉiuj politikistoj volonte faras grandiozajn paroladojn pri la eŭropaj valoroj kaj volonte agnoskas la valoron de lingva egaleco kaj kelkaj eĉ sin esprimas favore al Esperanto, en la realo ili faras al si kaj al ni la demandon en la titolo de ĉi tiu artikolo. Zamenhof pravis ankaŭ pri tio, ke “...al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta.”

Do, ni helpu nin mem se Eŭropa Unio ne helpas nin, aŭ verdire malhelpas nin [vidu la reagon al la plejmulta peto de la civitanoj en la tiel nomata reta konferenco pri la estonteco de Eŭropo pri Esperanto: *ni intensigu la instruadon de la angla!*]. Kaj la sola maniero por helpi nin estas plimultiĝi la nombron da eŭropanoj, kiuj komprenas la valoron de vera lingva egaleco kaj lernas Esperanton. Alivorte ni varbu eŭropanojn al nia movado. Esperanto estas sendube eŭropa ideo por la bono de la tuta mondo, unu el la multaj eŭropaj ideoj, kiuj celas plibonigi la vivon de la homaro, kaj pri kiuj ni povas fieri. Pro tio estas necese, ke



ESPERANTO POR MULTLINGVA EŬROPO

ĝi pluvivu en Eŭropo, kvankam lastatempe oni povas konstati, ke la entuziasmo disvastiĝis ĝin estas pli granda en Orienta Timoro ol en Okcidenta Eŭropo.

Ni kune povas ŝanĝi tion, laŭ la antikva metodo de Zamenhof mem, per informado kaj instruado. Ni devas esence multiĝi la kvanton da esperantistoj en Eŭropo, se ni volas esti aŭskultataj en Bruselo. Se la kvanto pliiĝas, ankaŭ la premoj diversspecaj al EU multiĝos. Ni bezonas multajn komencantojn en niaj kursoj. Forgesu pri honoraj prezidantoj kaj honoraj membroj. Ni vere bezonas honorajn komencantojn. Ni bezonas multajn lokajn aktivulojn en niaj eŭropaj lokaj kluboj kaj multajn membrojn de landaj asocioj, kiuj poste aŭtomate trovos sian vojon al EEU kaj TEJO/UEA.

La jaro 2024 estos jaro de eŭropa baloto. Ne multos landoj, en kiuj Esperanto estos parto de la programo de iuj kandidatoj. Tamen en multaj landoj civitanoj ne kapablos kompreni parolojn de politikistoj alilandaj. En ĉiuj landoj civitanoj havos malfacilon por kompreni kion deziras kaj proponas alilandanoj. Por kune decidi nian estontecon, ni bezonos transdoni informojn kaj opiniojn al kaj de aliaj landoj. Ni ĉi-

uj bezonos komunikilojn: eĉ ne-esperantistoj povos tion kompreni. Multaj el niaj samlandanoj povos konsciigi pri la problemoj de lingvoj en Eŭropa Unio; eble Esperanto povos aperi kiel solvo al ili.

Ĉiuokaze la komisiono pri agado en Eŭropo de UEA, Eŭropa Esperanto-Unio kaj Eŭropa Demokratio Esperanto proponas al vi partopreni la komunan informan kampanjon, kies tekston vi trovas en <https://mallonge.net/14f>.

Tie vi trovas emblemon kaj simplan tekston en pluraj lingvoj. Nia konsilo estas, ke vi montru tiun emblemon kaj tekston al kiom eble pli da NEesperantistoj vi povas per ĉiuj haveblaj rimedoj, rete, papere, televide, radie, Telegram, Instagram ktp.

Bonvolu ne perdi tempon diskutante inter vi kaj kun ni pri la koloroj de la emblemo aŭ pri la unuopaj vortoj de la teksto. Simple ŝanĝu ilin laŭ via gusto kaj alfrontu neesperantistojn.

Kaj se venas reagoj, vi aranĝu kursojn ĉeestajn aŭ retajn laŭ viaj eblecoj kaj kunlabore kun ILEI.

Kunlaboro kun TEJO kaj ĝiaj junularaj sekcioj estas kompreneble necesa.

Se vi havas demandojn kontaktu nin.

Ni plu japaniĝu!

Sonia Daubercies,
Mireille Grosjean

Jam antaŭ 13 jaroj ni japaniĝis uzante la ritmon de la **sumoo**-ĉampionadoj. Sesfoje jare ni legas dum du semajnoj danke al la ideo kaj klopodoj de Hori Yasuo. Bonvolu iri al Esperanta Vikipedio por scii pli pri tiu tre efika projekto.

Ni plu esploru la strategiojn, kiuj uzatas en la lando de la Leviĝanta Suno.

Jen du nocioj:

ETSU NEN. Transjara kurskunveno. Tia kurso okazas ĉiun jarfinon ĉe Oomoto en Kameoka (Vidu foton). La kurso daŭras 3-4 tagojn, sed la kerno de la evento estas studsesio trans la jarŝanĝo, do de la deka vespere de la

31-a de decembro ĝis la dua matene de la 1-a de januaro. La jarŝanĝo trovu nin laborantaj. Sekvas festo, evidente.

En Eŭropo diversaj kluboj, kie oni praktikas japanajn luktartojn kiel aikido, jam alprenis tiun japanan kutimon.

Post restado en Japanio en 2023, ni, Estraraninoj de Svisa Esperanto-Societo, planas tian staĝon fine de decembro 2023 en La Chaux-de-Fonds. La formo estos *gaŝjuku*.

Gaŝjuku havas komune la tradukon "kunloĝado". Tamen tiu formo bezonas klarigon. La kerna ideo de *gaŝjuku* estas dormi sub la sama tegmento kaj manĝi la saman rizon. Rezulto de

tio estas efika laboro. Pro tio ni proponas la formulon: "studcela aŭ laborcela kunloĝado". Ekzemple kiam okazas sesio ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Ĝenevo, la japanaj diplomatoj, kiuj tra la jaro loĝas en Ĝenevo kun la familio, devas iri al hotelo, kien alvenis aliaj diplomatoj el Tokio, kaj devas vivi kun ili por bone labori dum la du aŭ tri semajnoj de la UN-kunsido. Ili ne rajtas iri al sia familio samurbe. Per tiu metodo la laboro de la skipo fariĝas pli efika.

Ni faros tian staĝon en Svislando; la ideo povas plaĉi al aliaj kluboj aŭ Esperanto-centroj en la mondo. Ni prenu la efikajn strategiojn fruktodonajn, eltrovitajn en aliaj kulturoj.



Foto de Sonia Daubercies

Eventoj

15-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo

Paulo Viana

La 30-an de septembro kaj 1-an de oktobro 2023 okazis en la urbo Mogi das Cruzes la 15-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo, la unua en ĉeesta maniero post la pandemio de Kovim-19. La sidejo de la evento estis ĉe la Asocio de Subleŭtenantoj kaj Sergentoj de la Militista Polico, en tiu urbo. La kvanto de partoprenantoj estis malpli granda ol kutime, sed ĉirkaŭ dek urboj de la ŝtato reprezentigis, kaj la prezentitaj laboraĵoj montriĝis altnivelaj. La tuta programo estis plenumita en Esperanto, kaj ĉiun prelegon sekvis aktiva diskuto.

La malfermon faris la prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Esmeraldo Alencar Lima, kiu elstarigis la gravecon de ĉi tiu okazaĵo por la ŝtata Esperanto-movado. Fine de lia parolado, ĉiuj riverencis al la idealo Esperantista, dum sonis la Himno *La Espero*.

En la unua tago, oni prezentis la jenajn programerojn:
– Prelego: "Ĉu vi bone zorgas pri via cerbo?" (P.S.Viana);
– Prelego: "La evoluo de nia latina alfabeto" (James Piton);

- Intervjuo kun Esperanto-aŭtoroj (J. Piton, J.M.Progiant, P.S.Viana);
- Prelego: "Artefarita Intelektio: mitoj kaj faktoj" (J.M.Progiant);
- Prelego: "Carmina Burana" (Cristina Graaf);
- Prelego: "Vivo, morto kaj fantasto en rakontoj de Dino Buzzati" (A. Cesario);

En la dua tago de la kongreso, oni prezentis la jenajn laboraĵojn:



- Ateliero pri tradukado Portugala-Esperanta (P.S.Viana);
- Didaktika programero: “Kiel instigi, ke Esperanto-komencantoj ekparolu” (Wilian Gomes).
- Video: “Artefarita Intelekt” (Emílio Cid).

Dum la tuta 15-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo oni disponigis vendadon de libroj en kaj pri Esperanto, eldonitaj en Brazilo kaj eksterlande. Estis lan-

ĉitaj tri novaj verkoj: *Atako en Budapeŝto*, porjunula verko originale en Esperanto, de J.M.Progiant; *Helena*, konata romano de Machado de Assis, tradukita al Esperanto de P.S.Viana; kaj *Dora sentas sin sola...*, infanlibro originale en Esperanto, de P.S.Viana.

La 16-a Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo okazos en oktobro 2024, en la urbo Paulínia/SP.

Kulturo

La forto de la spirito

■ Elena Popova

Mi kaj Vladimir Ĵelev konas unu la alian de nia infanaĝo, ĉar ni estis samurbanoj kaj samklasanoj. Ankoraŭ nun mi vidas lin sidanta sur la unua benko, atente aŭskultanta la lecionojn. Estis modesta knabo. Poste ni perdis nin – ni lernis en diversaj lernejoj, universitatoj kaj ni loĝas en diversaj urboj. Renkontigis nin la lingvo Esperanto en 2002 dum la kongreso de BEA en la urbo Trojan kaj de tiam ni korespondas.

Tiutempe li lernis la Internacian lingvon Esperanto. Lia edzino estis esperantistino kaj ankaŭ lia filino.

Mi legis preskaŭ ĉion, kion li verkis, mi ĝojas, ke la malfacilaĵoj lin ne timigas.

Dum 2004 Ĵelev verkis bulgarlingve kaj eldonis la libron *La esperantista Movado inter la nevidantaj homoj en Bulgario* kaj en 2012 ĝian duan suplementon eldonon.

En 16.05.1998 en la urbo Plovdiv, kie li loĝas, estis kreita ANEB (Asocio de nevidantaj esperantistoj en Bulgario) kaj Vladimir Ĵelev estis elektita prezidanto. En 2014, laŭ sia deziro, li ĉesigis la aktivan laboron. La nuna prezidanto estas Stojan Stanĉev el la urbo Varna.

Dum la aktiva laboro de Vladimir Ĵelev en Bulgario estis organizitaj kelkaj Internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj – en la urbo Plovdiv dum 2000 oni okazigis la 66-an, en kiu partoprenis homoj el 14 landoj. Dum 2003 en la urbo Varna okazis la unua Internacia renkontiĝo el la balkanaj landoj. Dum 2008 en la ripozejo Albena okazis la 73-a Internacia kongreso, en la urbo


Obzor dum 2013 – la 79-a. Dum ĉiuj li estis prezidanto. Mi partoprenis la kongreson en Obzor, kien venis pli ol 80 esperantistoj ne nur de Eŭropo. Mi ne nur vidis, sed ankaŭ sentis la spiritan forton de la nevidantaj homoj. Mi komprenis, ke la partoprenantoj ne estas nur kongresanoj, ili estas geamikoj, ligitaj kun la nobla idealo de Zamenhof – ĉiuj homoj havu egalajn rajtojn vivi en paco kaj amikeco.

ANEB eldonas la revuon *Esperantista fajrero*, kune kun la Nacia biblioteko de la blinduloj “L. Braille” kaj la Asocio de la blinduloj en Bulgario (ABB). La redakta komitato: Angel Sotirov, Vladimir Ĵelev. Keranka Miluŝeva, Radka Stojanova. La revuo aperas en la variantoj: brajla, sur KD, platskriba. Ĝi estas presata en la brajla presejo de ABB. Lingva prizorganto kaj komputila pretigo: Fani Mihajlova. Pretigo por brajla presado: Keranka Miluŝeva.

Mi demandis lin pri kiuj homoj, kun kiuj li laboris kaj laboras, li volas diri bonajn vortojn. Li respondis: „Danĉo Danĉev, Veliĉka Karparova, Dimo Dimov, kiuj ne estas jam inter ni, Angel Sotirov, Keranka Miluŝeva, Stojan Stanĉev kaj aliaj homoj, kiuj helpas al ni ankoraŭ nun.

Vladimir Ĵelev verkis bulgarlingve kaj eldonis du librojn kun rakontoj *La rozo kaj Pri la boneco de la homoj*. Li ankaŭ verkis rakontojn en Esperanto, tradukis el Esperanto en la bulgaran. Dum 2012 li ricevis la duan premion en la Internacia literatura konkurso „Hristo Gorov“, Sofio.

Li estas honora membro de BEA kaj pri sia aktiva agado li ricevis multe da premioj. Kion donis al li Esperanto? En sia lasta libro li skribas:



Stojan Stanĉev kaj Vladimir Ĵelev (dekstre), dum 2017 antaŭ la monumento de la fama serba verkisto Ivo Andrić en Sokobanja, Serbio, kie okazis la 83-a IKBE.

„Kun Esperanto mi renkontiĝis dum tre malfacila momento en mia vivo. La mondo estis fermita ĉirkaŭ mi. La internacia lingvo malfermis antaŭ mi larĝan pordon al la mondo. Tiel dum la tempo ĝi iĝis nedisigebla parto de mia spirita Mío. Per la tradukoj, kiujn mi faras, mi esprimas mian estimon kaj respekton al la kreinto de tiu humana lingvo – la oftalmologo kaj Homo, doktoro Zamenhof.“

Diversaj sanproblemoj nun ne permesas al Vladimir Ĵelev esti aktiva kaj verki, sed laŭ mi li estas modelo por ĉiuj sanaj homoj kun sia forta spirito.

Vortoj: praktiku lingvojn saltante

■ KuboF Hromoslav
(Michal Matúšov)

UEA ĝoje partneras en projekto subtenita de Erasmus+ por krei novigan lingvo-lernan komputilan (retan) ludon Vortoj, kiu naskiĝis danke al Esperanto. Ni kore invitas vin ludi ĝin, kaj ankaŭ plipopularigi via(j)n ŝatata(j)n lingvo(j)n per ĝi.



Por ke lingvolernado estu sukcesa, ĝi devas esti amuza por la lernanto. Laŭ la fama plurlingvulino Lýdia Machová tio estas la 1-a regulo de efika lernado de lingvoj. Kaj certe ankaŭ vi mem rimarkis tion! Tamen, en lernejoj klasĉambroj ne nepre amuzo estas tiom ofta, kaj evidente ankaŭ tio (negative) influas lernajn rezultojn.

Kaj tial por pli amuziĝi lernante kaj praktikante lingvojn, estis kreita eduka komputila ludo, *Vortoj*. Ĝia nomo estas tute intence en Esperanto, ĉar ĝi estis koncipita en la Esperanta organizo E@I, fare de la ludfasonisto Kryštof Klestil kaj ekde komenco havis enhavon en Esperanto. Ĝia unika eco estas la eblo ludi per danctapiŝoj, danke al kio ludantoj ne nur praktikas vortojn, sed ankaŭ fizike moviĝas, kio helpas al sano. Tamen ludi eblas ankaŭ per kutima klavaro aŭ ludregilo. Komencaj testaj versioj havis uzeblan, sed malmultan enhavon, kaj nur ba-

zajn ludreĝimojn. Tial por igi la ludon pli abunda kaj mojosa, E@I partneriĝis kun 4 pliaj organizoj (INALCO – Franca Nacia instituto de orientaj lingvoj kaj civilizacioj, UEA, Privata baza lernejo en Nová Dubnica en Slovakio, kaj Kultura Esperanto-Asocio en Hungario) kaj komune eklaboris celante precipe (sed ne nur) al bazlernejoj. La organizoj ricevis malavaran financon subtenon de Erasmus+ de la Eŭropa komisiono, kiu ebligas la tutan projekton.

Rezulte, jam nun *Vortoj* disponas 6 ludajn reĝimojn, inklude la plej ŝatatan vortan priskribon de bildo kaj mojosan aventuran vetkuron. Por teni vin engaĝita vi havas 4 nivelojn de luda malfacileco. Priskribi tion tekste malfacilas, sed vi rapide komprenos ekludante. Ni laboras pri lud-eduka enhavo en pli ol 12 lingvoj, dekoj da temaj kategorioj (ekz. bestoj; fruktoj kaj legomoj; monda kultura heredaĵo ks.) en pluraj lingvaj niveloj (nun precipe en la niveloj A-B).

Danke al la menciita subteno de Erasmus+, la ludo estas por ĉiu senpaga. Ĝi funkcias plene per retumilo, do sen instalado. Por ludi ĝin venu al <https://vortoj.net>, kreu senpagan konton kaj ekludu! Vi povas ludi sola aŭ samtempe en paro. Via progreso estas registrata kaj komparata kun aliaj ludantoj en la rangolisto.



La organizoj ricevis malavaran financon subtenon de Erasmus+ de la Eŭropa komisiono, kiu ebligas la tutan projekton.

Ne nur ludi, sed ankaŭ kunkreu

Ene de la projekto ni aldonas kelkajn kernajn lingvojn. Sed ni invitas vin, lingvajn entuziasmojn, provizi enhavon en pluraj aliaj lingvoj. Ĉu via propra (regiona aŭ minoritata...) lingvo mankas? Kreu enhavon por ĝi! Simile, bv. helpi traduki la retejon kaj la ludon en vian lingvon. Kontakto nin ĉe info@ikso.net por interkonsenti detalojn.

Laste, ni esperas, ke vi mem ĝuos ludadon de *Vortoj*! Kaj se vi instruas en lernejo aŭ havas renkontiĝojn de klubo, invitu ludi ankaŭ ilin kaj informu nin pri tio (laŭeble ĝis la fino de 2023)!

<https://vortoj.net>
La aŭtoro partoprenas la projekton nome de UEA.



Strato en Kievo ekde nun portas la nomon de fama esperantisto


■ Eŭheno Kovtonjuk

Mi ege ĝojas informi vin ke dank' al penoj de nia fonduso en Kievo unu el la stratoj en la ĉefurbo en la kvietaj vilaĝsimila distrikto estas renomita de Riĥard Zorge al Vasil Eroŝenko. Estis pendigitaj la stratplatoj kaj informtabulo. Tio ne estis antaŭe anoncita kaj ne multis esperantistoj dum la labora tago.

Tamen tio okazis! Ĉiuj dezirantoj jam povos veni al la nova Esperanto-loko.

La unuan fojon en la ĉefurbo surstrate estas Esperanta teksto pri renoma esperantisto.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj, ankaŭ al kelkaj japanaj ĵurnalistoj!



Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>

Kial mi sentas min bone en Afriko?

■ Mireille Grosjean

Mi iris al Afriko unuan fojon en 2008, kiam ILEI organizis sian Konferencon en Porto Novo, la ĉefurbo de Benino. Poste mi reiris al Benino, mi iris al Togolando, al Burundo. En 2011 mi deĵoris en Dakaro nome de UEA kadre de la Tutmonda Socia Forumo. Mi reiris al Senegalo en 2013 por instrui. Mi ankaŭ estis en Maroko, en norda Afriko. Entute, adiciante miajn restaĵojn en tiu kontinento, mi estis dum pli ol jaro kaj duono en Afriko. Konata esperantisto korea diris: Mirejo estas afrikanino en Afriko kaj azianino en Azio.

Tamen mi estas svisino 77-jara kaj kutimas vivi en ĵuraso, en pejzaĝo plena je abioj, en regiono malvarma en vintro.

Kio plaĉas al mi en Afriko?

Tre agrabla sento por mi estas vivi en socio, kiu konsistas ĉefe el **junaj personoj**. La homamaso en urboj estas junuloj. Do la etoso estas vigla, gaja, spontana; mi havas la impreson, ke mi juniĝas en kontakto kun ili. Plieregas granda respekto al maljunaj personoj, do mi sentas min plej feliĉa, iom


kiel en mielopoto, aŭ kiel fiŝo en pura akvo!

Tre agrabla sento por mi estas **vi-di kolorojn**. Fakte estas, ke eŭropanoj plej ofte surhavas nigrajn aŭ grizajn vestaĵojn, aŭ malhelbluajn kiel ĝinzoj, foje blankajn aŭ helbrunajn. La rezulto estas trista vido. En Afriko abundas la kotonaj koloraj vestaĵoj kaj la okuloj kaj animo ĝojas vidante tion.

En Svislando en urboj, en superbazaroj aŭ atendejoj, miaj oreloj baniĝas en usoneca muziko. Tio ĝenas min, sed tio estas modo kaj mi ne povas eviti tion. En Afriko tio ne okazas. Se estas muziko, temas pri **afrika muziko** kaj tiam regas **harmonio** inter la loko, kie vi estas, kaj la muziko, kiu atingas viajn orelojn. Kaj tio donas tre agrablan senton. Mi estas finfine liberigita de usoneca muziko. Okazis en Kotonuo, Benino, ke frumatene mi aŭdis kristanajn kantojn afrikstilajn kune kun la voĉo de muezino, kiu vokis al la islama matena preĝo, kaj aldoniĝis iu koko, kiu kokerikis laŭte kaj vikle! Mirinda «spektaklo» por miaj oreloj kaj mia animo.


*sen usona muziko
koloroj
juneco de la popoloj*

Suisse 2018



Perspective monde, date de consultation: 4/9/2023, source: Banque mondiale

Tanzanie 2018



Perspective monde, date de consultation: 4/9/2023, source: Banque mondiale



Promeno tra historiaj lokoj de la zagreba Esperantujo

■ Spomenka Štimec

Kadre de la Monatoj de vivanta heredaĵo en Eŭropo, sub la egido de Unesko, en septembro kaj oktobro en la fokuso estas la nemateria heredaĵo.

Kadre de tiu programo en Zagrebo okazis la promenado de esperantistoj tra la historie gravaj lokoj de la zagreba Esperantujo.

Partoprenis pli ol 20 personoj. Dum la vizito oni haltis ĉe la plej malnova tabulo honore al la fondintoj de la Aso-



cio, ĉe la tabulo memore al la unua redakcio de iu kroata Esperanto-gazeto *Kroata Esperantisto* el la jaro 1909. Oni memoris pri la redaktorino, instruistino Danica Bedeković kaj pri la starginto de la tabulo Zagreba Esperanto-Ligo kaj ties prezidanto Radenko Milošević.

Plia halto estis la adreso Amruševa 5, kie aktivis esperantistoj de 1947 ĝis 1999. Spomenka Štimec rakontis pri la historio de la domo kaj la vivsorto de la posedinto de la ejoj Sigmund Schotten, kiu pereis en la koncentrejo Auschwitz en 1942. Espereble li baldaŭ ricevos memorŝtoneton sur la trotuaro antaŭ la domo. (Pri tiu memoragado per memorŝtonetoj zorgas la zagreba juda komunumo.)

Fine ni vizitis la Zamenhof-straton kaj memoris la Universalan Kongreson de Esperanto el la jaro 1953, kiam la stratonomadon efektivigis Ivo Boro-večki.

La 1-an de oktobro en la programo "La vivanta heredaĵo Esperanto" vere vivis sur la zagreba stratoj.



Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Ĉinio: Fei X.

Hungario: I. Keményfi.

SOCIETO ZAMENHOF

Danio: T. Bak, S.F. Jørgensen.

DUMVIVA PATRONO DE TEJO

Hungario: I. Keményfi.

DONACIOJ

ĝis la 5-a de oktobro 2023

Amsterdama Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto

Francio: kolektitaj donacoj pere de Espéranto-France 397,00.

Nederlando: Esperanto Nederland 250,00.

Sumo ĉi-jara: 9850,00.

Fondaĵo Afriko Por la UK en Arusha (Tanzanio):

Francio: G. Darrieux 400,00.

Sumo ĉi-jara 10049,05.

Fondaĵo Canuto

Luksemburgo: I. Ertl 20,00.

Nederlando: R. Moerbeek 25,00;

F. van Zoest 25,00.

Sumo ĉi-jara: 1257,49.

Virtuala Kongreso 2023

Sumo ĉi-jara: 3335,00.

Volontula Domo

Usono: L.M. Gregg per E-USA 37,29

Sumo ĉi-jara: 98,77.

Ĝenerala Kaso

Germanio: A. Nonima (2x) - po 888,76.

Hungario: L. Pásztor 20,00.

Alianco 365: 155,00.

Sumo ĉi-jara: 9205,83.

Ĉu unua spuro de vivo ekstertera? JWST observis signojn de eventualaj oceano kaj vivo en eksterplanedo K2-18b

■ Amri Wandel

Kelkajn tagojn antaŭ la fermo de la oktobra n-ro estis publikigita esploro kiu eble heroldas la unuan signon pri ekzisto de biologia vivo ekstertera. Kvankam ne certa, sciencistoj samkiel la amaskomunikiloj ekscitiĝas. Sekvas en nia rubriko ankaŭ alia grava novaĵo pri IKU: ĉiuj prelegoj de IKU kaj la Scienca Kafejo en Torino estos spekteblaj en la 4-a Virtuala Kongreso kaj poste en la jutuba kanalo de UEA.

En septembro 2019 la scienca mondo ekcitiĝis kiam la spacteleskopo Hubble unuafoje malkovris akvo-vaporon sur eksterplanedo nomata K2-18b, kiu orbitas etan ruĝan sunon (la astronomia termino estas ruĝa nano) ĉ. 120 lumjarojn for de la Tero. Kvar jarojn poste, la 11-an de septembro 2023, sciencistoj anoncis la malkovron de pliaj molekuloj kiuj povus rilati al biologiaj procezoj, en la atmosfero de la sama planedo, ĉi-foje per la nova spacteleskopo James Webb: <https://mallonge.net/13y>. La malkovro subtenas la ekziston de oceano kaj vivo, kiel klarigas la ĉefesploristo en por-gazetara video publikigita de la Kembriĝa universitato: <https://mallonge.net/13z>.

En intervjuo elsendita de la israela kultura kanalo "Kan Tarbut" Amri Wandel klarigis la signifon de la malkovro, dirante ke tiu kaj similaj malkovroj estas la hirundo kiu aŭguras novan eraon: serĉo de vivsignoj en eksterplanedoj per la potenca teleskopo James Webb. La sekva malkovro kiun multaj atendas, estos eventuale spuroj de oksigeno, kiu povus indiki atmosferan konsiston modifitan de fotosintezo, kiel okazis sur la Tero.

Tiaj kaj similaj vivspuroj sur eksterplanedoj de ruĝaj nаноj (Esperanto 2023:6 p. 142) estos la studtemo de Wandel en nova esplor-centro kiun li kunfondis kun aliaj israelaj kaj germanaj esploristoj. Skribas pri tio la nova magazino de la fondaĵo Fulbright (<https://mallonge.net/14g>): "Profesoro Amri Wandel estis elektita por establi la novan *Minerva-Centron por la studado de planeda disvolviĝo de vivo, la fonto de vivo, kaj astrobiologio*. La centro estas kunlabora projekto de kvin israelaj kaj du germanaj ĉef-esploristoj."

Pri la nova malkovro en la amaskomunikoj

Ene de kelkaj tagoj aperis en la mondaj amaskomunikoj dekoj da artikoloj pri la ekcita malkovro (ekz. BBC: <https://mallonge.net/14h> kaj National Geographic: <https://mallonge.net/14i>). Multaj videoj aperis en jutubo (ekzemple la populara <https://mallonge.net/14j>).


Jen traduko de parto de artikolo pri la malkovro, aperinta en "Haaretz" (unu el la tri plej gravaj ĵurnaloj en Israelo): <https://mallonge.net/14k>.

James Webb malkovris potencialan oceanon je distanco de 120 lumjaroj. Molekuloj trovitaj en la planedo K2-18b povas indiki la ekziston de oceano kaj biologiajn procezojn.

La esploristoj tamen klarigas, ke la analizo pri la ekzisto de dimetil-sulfido, kiu sur la Tero estas formata de vivantaj organismoj, ne estas solida kaj pliaj esploroj estos faritaj por konfirmi tiun rezulton.

La eksterplanedo K2-18b orbitas sian sunon je distanco de unu sepono de la distanco inter la Suno kaj la Tero. Cetere, tiu suno estas ruĝa nano, malpli ol duono de la grandeco de nia Suno kaj multe malpli varma. Tiu kombino tamen ebligas likvan akvon sur la planeda surfaco. La planedo estas nur duoble pli granda ol la Tero, pro kio la esploristoj taksas, ke ĝi estas rokeca.

Kvankam la plej granda probableco de vivo simila al tiu kiun ni konas, estas sur planedoj similaj laŭ grandeco al la Tero, tiuj planedoj estas tre malfacile mezureblaj kaj observeblaj, ĉar ili estas relative malgrandaj. La plej multaj el la planedoj kie signoj de akvo en la atmosfero estis trovitaj ĝis nun, estas multe pli grandaj kaj pli varmaj ol la Tero, kondiĉoj nefavoraj por la disvolviĝo de vivo.



NASA, CSA, ESA, R. Crawford (STScI), J. Olmsted (STScI) (<https://mallonge.net/13y>)

Profesoro Amri Wandel el la Hebrea Universitato klarigis: “La kondiĉoj en K2-18b estas inter la plej favoraj por malkovri vivon per nia nuna teknologio. La kialo estas la nekutima rilatumo inter la grandeco de la suno kaj la grandeco de la planedo. En ĉi tiu sistemo la suno estas relative malgranda ruĝa nano, dum la planedo, kvankam rokeca, estas relative granda.”

Karakterizi la atmosferon de eksterplanedoj estas centra kampo en astronomio kaj la serĉo de vivo en la spaco. Kiam planedo pasas precize inter sia suno kaj nia teleskopoj, la lumo de la suno pasas tra la planeda atmosfero. Ĉiu gaso sorbas lumon en unika maniero, tiel ke analizo de la ondolongoj kiuj atingas la teleskopon povas informi pri la atmosfera konsisto. En la nuna observado oni trovis grandajn kvantojn de metano kaj karbondioksido, sed nur iomete da amoniako, kombinaĵo kiu subtenas la ekziston de oceano de likva akvo.

Alia ekscita konkludo de la spektra analizo de K2-18b estas la eventuala ekzisto de molekulo nomata dimetil-sulfido, kiu sur la Tero estas formata nur de biologiaj procezoj en vivantaj estaĵoj, plejparte de fitoplanktono en la oceanoj. Tiu ĉi trovo ankoraŭ ne estas tute certa kaj la esploristoj planas pliajn observaĵojn por konfirmi ĝin. “Nia celo estas detekti vivon sur ekster-planedo, kio ŝanĝos nian perspektivon de nia loko en la universo”, diris la ĉefesploristo de la studo, profesoro Nikku Madhusudhan de la Universitato de Kembriĝo. “La nunaj trovoj estas promesplena paŝo en ĉi tiu vojaĝo.”

La sciencaj prelegoj de Torino estos spekteblaj en VK-4

Kvankam ĉiuj (pli ol dudek) prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo en Torino estis plene

hibridaj, averaĝe nur 10-20 personoj sekvis per Zoom, eble pro nesufiĉa kono de tiu relative nova trajto. La informoj pri la ebleco rete spekti la sciancan programon dum la UK estis vaste diskonigitaj, ĉu per Gazeta Komunikado (uea.org/gk/1113a1), ĉu per retlistoj de UEA, per Eventa Servo kaj la reta *Kongresa Kuriero*. Tamen pluraj kiuj deziris spekti defore, ne trovis ĝin aŭ maltrafis la sesiojn. Ankaŭ multaj ĉeestantoj en la UK konscie maltrafis plurajn IKU-prelegojn, ĉar samtempe okazis aliaj programeroj. Por ĉiuj kiuj maltrafis aŭ volas respekti, ĉiuj sciencaj prelegoj estos spekteblaj en la kvara Virtuala Kongreso de UEA fine de novembro (uea.org/gk/1129a1), same kiel la scienca programo de la pasintjara UK en Montrealo estis spektebla dum pli ol du monatoj en la VK-3. Estas ankaŭ plano iom-post iome aperigi ĉiujn registritajn IKU- kaj SK-prelegojn (kaj de Montrealo kaj de Torino) en la jutuba kanalo UEA-viva.

IRIS denove okazos fine de oktobro, UEA invitas proponi por la IKU en Aruŝo, 2024

Post du jaroj TEJO denove okazigos la sciancan kaj fakan virtualan aranĝon IRIS, kadre de RETOSO:

Internacia Reta Interfaka Simpozio (IRIS) de la 27-a ĝis la 30-a de Oktobro 2023. Aliĝu ĉe la retejo (retligo ĉi-sube).

Por la unua afrika UK estas planita riĉa sesio de la Internacia Kongresa Universitato kiel kutime. Aparte UEA kuraĝigas partoprenon de afrikaj kontribuantoj, sed ankaŭ ekster-afrikaj proponoj proponoj estas tre bonvenaj. Bv. sendi la proponojn al amri@huji.ac.il ĝis la 31a de januaro 2024. Kiel en la du antaŭaj UK-j, estas planata hibrida scienca programo, kun eblo aŭskulti defore. Principe ankaŭ eblos prelegi per Zoom, kvankam surlokaj prezentadoj estos preferataj. Vidu la detalojn en uea.org/gk/1134a1.

Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

Kiel donaci?

Per banko:

UEA-konto en ING Bank,
Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –

https://revuoesperanto.org/alianco_365.

Ni daŭrigu kune!

Kiel membro de UEA...

- vi kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto: UEA subtenas la movadon en multaj landoj kaj kunordigas la regionan agadon tutmonde;
- vi plifortigas la voĉon de la lingvo kaj la movado: UEA reprezentas la movadon ĉe UN kaj Unesko kaj pledas por justeco kaj egaleco sur la lingva kampo;
- vi subtenas la efikan instruadon de Esperanto: UEA eldonas modernajn lernilojn, kunlaboras kun lingvoekzamencentro por la KER-ekzamenoj, donas financon subtenon al ILEI kaj aliaj kunagantoj;
- vi kunaktivas por Esperanto kaj daŭripova mondo: UEA donas multajn rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de aktivuloj.

Konkrete, de UEA vi ricevas:

- revuojn (*Esperanto* kaj ĝis inkl. 35 jaroj: *Kontakto*), kiuj traktas aktualajn temojn de la movado kaj la monda socio;
- kongresojn, kie esperantistoj el la tuta mondo kune kulturumas, kleriĝas kaj kunplanas agadon;
- aktivulajn retojn kaj servojn pri ĉio ekde libroj ĝis reprezentado.

Aliĝu al UEA nun! Uzu la retan aliĝilon ĉe:

<http://uea.org/alighoj/alighilo>.

